

Ipl 31 (4/99)

Enhavo

1	El la universitata vivo	2
1.1	Doktorigaj disertacioj.....	2
1.1.1	Pri metalingvaj kapabloj (Mauro La Torre).....	2
1.1.2	Pri la tempa sistemo de Esperanto	2
1.2	Diplomigaj disertacioj	2
1.2.1	La dilemo de Esperanto (Renato Corsetti).....	3
1.2.2	Pri terminologio en Esperanto (Detlev Blanke)	4
1.3	Lingvoplanado kiel pedagogia rimedo en la edukado de filologoj (Interlingvistiko vivproksime) Katalin Smidéliusz.....	4
1.3.1	La programo de la studobjekto Interlingvistiko	5
1.3.2	La metodikaj papoj de la lingvoplanado.....	5
1.3.3	Praktika elprovo de la lingvoprojektoj.....	6
1.3.4	Konkludo	6
2	Libro pri frazeologismoj en Esperanto	7
3	Norbert Wiener pri Esperanto.....	12
4	Bibliografioj.....	13
4.1	Aperis nova volumo de la MLA-bibliografio (HumphreyTonkin)	13
4.2	Bibliografio pri Ido.....	14
4.3	Trovanto helpas trovi en Vieno	14
5	Interlingvistikaj materialoj el Italio	15
6	Ĝeneraj retpaĝoj pri interlingvistiko.....	16

La redaktoro klopodas revui la plej gravajn aktivaĵojn kaj eldonaĵojn pri interlingvistiko kaj esperantologio.

Tamen, la kunlaboro de ĉi-fakaj kolegoj povus esti pli aktiva. Estas konate, ke en diversaj landoj aperas interlingvistiko-rilataj materialoj en lingvistikaj libroj aŭ revuoj. Mi volonte ricevus fotokopiojn de la materialoj, por ilin bibliografii kaj prezenti. La samo validas por universitataj laboraĵoj diversnivelaj, de diplomigaj ĉis doktorigaj aŭ habilitigaj. Ankaŭ ilin mi volonte prezentus, sed bezonas ekzempleron de la verko.

1 El la universitata vivo

Jen kaj jen aperas doktorigaj, diplomigaj kaj magistrigaj disertacioj. Pro la relativa malofteco ili estas registrataj ankaŭ en Ipl. Tamen, bedaŭrinde la informoj ofte estas mankohavaj. Necesas sistema enketo pri tiaj universitataj laboraĵoj, por povi daŭrigi la bibliografian laboron tiel modele komencitan de Edward Symoens.

1.1 Doktorigaj disertacioj

1.1.1 Pri metalingvaj kapabloj

- *Piscopo, Giuseppina: Ricadute metalinguistiche dell'apprendimento dell'esperanto in alunni di scuola media (Influo de Esperanto sur metalingvaj kapabloj). Università degli Studi di Roma "La Sapienza". Facoltà di Psicologia. Tesi di laurea. Cattedra di Psicopedagogia del linguaggio e della comunicazione. 85 p.*

Komento de prof. Mauro la Torre:

La studentino de la Unua Roma Universitato "La Sapienza" doktoriĝis pri psikologio, pridiskutante la "tezon", ke la kono de la Internacia Lingvo povas pliigi la "metalingvajn" (= lingvopripensajn) kapablojn de la infanoj, eĉ pri sia denaska lingvo. Tiucele ŝi prilaboris la rezultojn de instru-eksperimento ESP 2, aranĝita de la Tria Universitato en specimeno da italaj bazlernejoj. Laŭ la disertaĵo de tiu studentino el Napolo - kaj laŭ ŝia "referanto" prof-ino Pinto - la statistikaj datumoj konfirmas tiun tezon: la klasoj, kie oni lernis Esperanton dum unu jaro kaj duono, montris rimarkinde pli bonajn rezultojn en la testoj pri metalingva kapablaro, kompare kun ceteraj klasoj. La eksperimento jam ekvekas intereson ĉe psikolingvikaj kaj instrusciencaj medioj.

Maŭro La Torre, Pedagogiscienca Laborejo, Tria Roma

Universitato

<m.latorre@uniroma3.it>

1.1.2 Pri la tempa sistemo de Esperanto

- *Dankova, Natalia: Temporalité en Esperanto. Étude du transfert. Thèse pour le Doctorat en Sciences du Langage sous la direction de Monsieur le Professeur Clive Perdue. Université*

1.2 Diplomigaj disertacioj

Per diplomigaj, magistrigaj aŭ similaj disertacioj la studentoj kutime finas sian universitatan studadon. Jen du aparte interesaj:

1.2.1 La dilemo de Esperanto

- *Gobbo, Federico: Il dilemma dell'esperanto - Tra vocazione ausiliaria e naturalizzazione, Tesi di laurea, Universita' degli Studi di Torino, Anno Accademico 1997/98, Ciar.mo Prof. Fabrizio A. Pennacchietti. Facoltà di Lettere e Filosofia. Corso di Laurea in Scienze della Comunicazione, Disciplina di Laurea: Interlinguistica ed Esperantologia, 253 paĝoj*

Pri la studofina verkaĵo Renato Corsetti verkis jenan tekston:

Pri fama itala verkisto de la renesanca periodo, Pietro Aretino, oni skribis: "Li fi-parolis pri æiuj krom Kristo, kaj li pardonpetis pri tio, dirante ke li ne konas tiun".

Federico Gobbo, juna itala esperantisto, havas plurajn komunajn trajtojn kun Pietro Aretino. Lia disertacio en la universitato de Torino, verkita sub la gvido de profesoro Fabrizio Pennacchietti, estis aprobita kun la maksimuma poento kaj kun mencio pri øia presindeco. Tion øi meritis, interalie, pro la stilo absolute malpeza kaj amuza, kion oni malofte trovas en tiaj verkoj, kies celo þajnas esti: "Ju pli la stilo estas teda, des pli øi similas veran sciencan libron!".

Kial la disertacio estas inter la plej bonaj disertacioj, kiujn mi iam ajn vidis? Fakte F. Gobbo faris tre kompletan ekzamenon de la fenomeno Esperanto por universitataj kleruloj, sen prudenta silento pri tiklaj punktoj sed ankaŭ kun tre þatindaj personaj emociaj konfesoj. Øi provas enmeti Esperanton en la kadron de la lingvistaj klasigoj de lingvoj kaj li ankaŭ provas kompreni pro kiuj psikologiaj kialoj lingvistoj rifuzas okupiøi pri øi. Øi originale reskribas la historion de Esperanto kaj la (verajn) celojn de esperantistoj. Eble en æi tiu kampo, mi persone trovas tro subjektiva lian gravigon de la religiaj motivoj de multaj esperantistoj. Mi konsentas ke Zamenhof havis mistikan personecon kaj ke por li religio estis eble pli grava ol la lingvo mem, sed mi persone donus multe malpli da graveco al la religiaj elementoj, kiuj enestas en la Esperanto-komunumo (de la bahaa movado al Oomoto). F. Gobbo, aliflanke, tre klare montras ankaŭ sian propran personan sintenon kaj malkaþas, ke li estas konvinkita katoliko (tio estas io, kion en Italujo oni ne volonte agnoskas, æefe ne en universitataj medioj, kie estas tre pli laŭmode esti nekredanto). Sed ni revenu al Aretino. F. Gobbo senkompate malkaþas la

kontraŭdirojn de æiuj esperantistaj pensofluoĵoj, de la finvenkistoj (kiuj prefere okupiĝas pri si mem kaj siaj ambicioj), de la raŭmismoj (kiuj provas anstataŭigi unu finvenkismon per alia) kaj de aliaj. Mi trovas la finajn kvar paĝojn (Konkludoj kaj perspektivoj) absolute brilaj. Li parolas pri la fundamenta kontraŭdiro de Esperanto inter la rolo de monda help-lingvo kaj de lingvo de aparta komunumo, la esperantistaro. Li priskribas la kialojn pro kiuj la esperantista "identeco" neniam povas esti sola aŭ æefa identeco. Por uzi liajn vortojn, oni ne povas esti samtempe kristano kaj islamano aŭ franco kaj germano, sed oni ja povas esti germano kaj esperantisto, franco kaj esperantisto, ktp. Espereble æi tiu disertacio baldaŭ aperos libroforme en la itala kaj eble ði aperos ankaŭ en Esperanto, æar estas bone por esperantistoj de tempo al tempo elveni el la arboj kaj rigardi la arbaron. F. Gobbo provas fari tion kvazaŭ li estus neesperantisto. Oni povas ne konsenti pri detaletoj jen kaj jen (se mi ne miskomprenis, Esperanto estas priskribata kiel "pro-drop"-lingvo, kio laŭ mi ne estas ðusta), sed oni devas agnoski ke entute la verko estas tre penso-stimula. Scipovantoj de la itala povas ricevi ekzempleron kontraŭ la fotokopiaj kostoj (proksimume 40 nederlandaj guldenoj) æe Itala Esperanto-Federacio.

Renato Corsetti

1.2.2 Pri terminologio en Esperanto

- Schweder, Sandra: *Entwicklung und Akzeptanz technischer Terminologien in der Plansprache Esperanto. Arbeit zur Erlangung des akademischen Grades einer Diplom-fachübersetzerin. (Gutachter/Expertizantoj: Prof. Dr. Reiner Arntz, Dr. Francis Jarman). Universität Hildesheim. Fachbereich III – Sprachen und Technik. Institut für Angewandte Sprachwissenschaft. Juni 1999, 230 p.*

Pri la laboraĵo Detlev Blanke informis:

La studentino pri faka tradukado æe la germana universitato de Hildesheim, Sandra Schweder, verkis brilan diplomigan disertacion pri „Evoluo kaj akcepto de teknikaj terminologioj en la planlingvo Esperanto“. La 230-paĝa laboraĵo, surbaze de profunda eluzo de la faka literaturo kaj post konsultoj de kompetentaj personoj, resumas bazajn nociojn de interlingvistiko, karakterizas Esperanton kaj ðian lingvokomunumon, elstarigas la signifon de la planlingvo por la evoluo de la terminologio-scienca (Wüster, Drezon) kaj prezentas la æefajn direktojn kaj atingojn de la terminologia laboro en Esperanto (de la jarcentkomencoj ðis la „Terminologia Gvidilo“, eldonita de TEC). Ĥi ne kaĉas la aktuale nekontentigan situacion de la

terminologia agado en Esperanto. Pli ol 100 paĝojn la aŭtorino fine dediĉas al originala kaj solida analizo de la komputika terminologio, montras ties evoluon kaj problemojn kaj fine forte pledas por kompetenta kaj pli aktiva planado kaj normigado de terminologioj en Esperanto. Almenaŭ ĉi-tiu parto de la verko meritas publikigon en Esperanto. Pia laboraĵo bonege subtenas la daŭre releviantajn (sed ĉis nun tro seneĉajn) postulojn pri pli sistema terminologia aktivado en Esperanto, farenda surbaze de internaca scienca nivelo.

1.3 Lingvoplanado kiel pedagogia rimedo en la edukado de filologoj (Interlingvistiko vivproksime)

Katalin Smidéliusz

Jen ni prezentas partojn el ege interesa materialo ricevita de nia hungara kolegino, kiu instruas interlingvistikon en la Pedagogia Altlernejo de Szombathely, Hungario. Kiu interesiĝas pri la kompleta teksto bv. kontakti ĉin. Red.

1.3.1 La programo de la studobjekto Interlingvistiko

Kadre de la universitatranga fako „aplikata lingvistiko“, kiu estis lanĉita en la Pedagogia Altlernejo de Szombathely, en la studjaro 1998/99, la studobjekto interlingvistiko ricevis lokon en la programo. Ĉi estas instruata dum du semestroj.

La celo de la objekto estas: studi lingvopolitikajn demandojn, ekzameni apriorajn kaj aposteriorajn filozofiajn lingvoprojektojn, ekkoni la plej gravajn planlingvojn.

Kvankam la fakoj de la plej multo el la studentoj estas la angla aŭ la germana, estis ĝenerale rimarkebla fakto, ke komence ili posedis tre malmultajn ĝeneral-lingvistikajn konojn. Ili kapablis havi superrigardon nek pri sia gepatra lingvo, nek pri la konataj fremdaj lingvoj, ne povis doni pri ili strukturajn analizojn. Ilia lingvokono konsistis nur el la traduko de konkretaj strukturoj kaj esprimoj.

La temo de la nova studobjekto postulis, ke la studentoj travidu la strukturojn de la lingvoprojektoj, kapablu eltiri proprajn konkludojn. En la mensoj de la studentoj kreiĝu konkretaj pretendoj dum la analizo de la unuopaj lingvoj.

1.3.2 La metodikaj paĝoj de la lingvoplanado

Por faciligi la studojn, tro teoriajn por unuakursano, ni alproksimiĝis al la temo de la praktika flanko.

La laboron ni realigis en malgrandaj grupoj , kiuj laboris en tri ĉtupoj.

Por la unua provo la studentoj, sen iu ajn antaŭprepariĝo, dum seminaria horo devis skizi la bazon de propra lingvoprojekto.

La projekto estis destinita kvazaŭ iĝi la nova, komuna lingvo de la Eŭropa Unio. La lingvo devis esti *simpła, regula, facile lernebla kaj la leksiko devis baziĝi sur la eŭropaj lingvoj.*

En la dua etapo la grupoj povis labori pri la projekto dum du monatoj, por ellabori la detalan gramatikon de la lingvoprojekto, kaj krei ties bazan vortprovizon kaj modelfrazojn.

La tria fazo estis, kiam la grupoj devis prezenti sian lingvoprojekton al la aliaj, argumenti pri la logikeco de siaj solvoj, respondi al la starigitaj demandoj.

Ĉe tiuj tri fazoj havis siajn lingvistikajn kaj pedagogiajn taskojn (kaj ankaŭ spertojn).

.....

1.3.3 Praktika elprovo de la lingvoprojektoj

La vera elprovo de la prezentitaj projektoj povos efektiviĝi, kiam ĉiu grupo kapablos traduki al sia lingvo la saman tekston, la lingvajn formojn, sisteme listigitajn ekzemplofrazojn. Dum la tradukado la studentoj povis rimarki la mankojn de siaj lingvoprojektoj, la neuzeblecon de la malbone aŭ nekomplete prilaboritaj strukturoj. Tiam la studentoj havis eblon pluperfektigi sian projekton, aldoni la mankantajn elementojn.

Dum la posta analizo la tradukoj de la sama teksto donas pli bonan eblon por la komparo kaj analizo de la projektoj.

1.3.4 Konkludo

Ĝeneralaj spertoj:

Planado de lingvo kiel tasko estis nekutima al la studentoj, sed ili komencis la laboron kun granda entuziasmo. (Estas alia problemo, ke unu el la grupoj ne klopodis prepari sistemon plejble taŭgan, ne povis/volis persiste labori).

Dum la procezo mi sukcesis alkonduki la studentojn al konscia kaj regula ekzameno de lingvaj sistemoj, al ampleksa struktura analizo de la gepatra lingvo, malkovro de lingvaj universalaĵoj kaj instigi ilin al ties kreiva apliko.

Dum la dua parto de la semestro la analizon de la kutime alte taksataj lingvo(projektoj) (*Volapuko, Esperanto, Ido, Occidental, Interlingua, hungara Romanid, novaj: Uropi, Klingona lingvo, Eýropanto*¹) ili faris jam laŭ siaj spertoj, komparante, rigardante per aglaj okuloj la diversajn sistemojn, seræante la formojn kaj solvojn, konvenajn al siaj pretendoj. La akiritajn spertojn ili povos bone utiligi dum siaj filologiaj studoj kaj lingvoinstrua praktiko.

Studento jene resumis la esencon: “ Se mi eklernos novan lingvon, mi komencos ne per la lernolibro, irante de unu leciono al la alia, sed mi unue trastudos la gramatikan libron. Kial oni ne tiel instruis nin øis antaŭe?” Fakte, kial ne?

Kiel tiu eksperimento utilis al Esperanto?

Krom la menciitaj utilaj lingvistikaj spertoj la studentoj vole-nevole havis daŭran kontakton kun planlingvoj, al kutimiøis al la ideo, ke tiuj ekzistas. Ja pluraj el tiuj lingvoj el inter ili funkciis kaj eæ nun funkcias.

Fine de la dua semestro dum la ekzameno ili devos profunde koni unu el la pritraktitaj lingvoprojektoj. Literaturon por la prepariøo mi mem disponigis aŭ direktis ilin al la reto. Nur unu lingvo estis, kiun mi pretis instrui post la devigaj lekcionoj. Tiu lingvo estis Esperanto.

La fakultativan kurson vizitis pli ol la duono de la grupo kaj multaj sincere ekinteresiøis pri la lingvo kaj ties movado. Vizitis la studentojn ankaŭ la estrino de la landa junulara sekcio kaj ŝi rakontis pri la eblaj kontaktoj, sekvaj Eo-aranøoj. La informoj tiam venis de samaøulo kaj ne de la profesorino. Ankaŭ tio multe helpis. Kelkfoje alia juna esperantisto venis kaj helpis ilin en la lernado, malebligante, ke la lingvo ligiøu ekskluzive al mi.

La funkciadon de E-o la studentoj mem povis sperti, kiam dum unutaga ekskurso ni vizitis en Vieno la Internacian Esperanto-Muzeon kaj tie la direktoro de la muzeo, Herbert Mayer en Esperanto prelegis pri la planlingvoj Occidental kaj Interlingua. Tiam evidentiøis, ke nia internacia lingvo ankaŭ taŭgas por fakaj, sciencaj celoj.

¹ La Klingona kaj Eýropanto fakte ne estas kompareblaj kun la kutimaj planlingvoj. La klingona estas konceptita identigilo de sciencfikcia tribo el la kosmo, la klingonoj (el la usona televida serio „Star Trek“) kaj konscie farita ege malfacile lernebla kun tre limigitaj komunikceloj. Do, la faciligo de internacia komunikado ne estis øia celo. Eýropanto fakte estas satiraøo, ne vere serioza provo de planlingvo, kvankam øi

Tio ĉajnis esti grava argumento por E-o.

Al la ekskurso ankaŭ aliøis junaj nefilologaj esperantistoj, kiuj daŭre parolis Esperanton inter si kaj kun mi, kion pluraj el la grupo unue nur observis, poste ankaŭ iom partoprenis.

Eble el la trideko da filologoj nia movado gajnos “nur” kvar-kvin esperantistojn, sed certe ankaŭ en la aliaj restos pozitivaj opinioj pri la planlingvoj, kiujn ili povos transdoni dum la postaj lingvistikaj agadoj.

La studobjekto daŭre restos en la programo kaj ni volonte akceptos sugestojn, kritikojn, laborkontaktojn kaj librodonacojn, kiuj povos helpi pliprofundigi nian laboron.

Katalin Smidéliusz <smidik@rik.bdtf.hu>

2 Libro pri frazeologismoj en Esperanto

La habilitiga disertacio de Sabine Fiedler (kp. lpl n-ro 30) aperis kiel libro:

Fiedler, Sabine(1999):Plansprache und Phraseologie. Empirische Untersuchungen zu Reproduziertem Sprachmaterial im Esperanto. Frankfurt/ a. M. [et al.]: Lang, 444 p. ISBN 3-631-34088-5

3 Norbert Wiener pri Esperanto

Mi trovis æi-suban tekston, kiu perfekte ligiøas al la supre prezentita libro, kiu i.a. brile pravas la kulturecon de Esperanto. Øin kunmetis prof. Jouko Lindstedt.

Red.

Danke al Harald Helfgott kaj Boris Kolker mi ricevis la æi-suban citaøon el verko de Norbert Wiener (1894-1964), fama matematikisto kaj kibernetikisto, kies patro konatiøis kun Esperanto en Varsovio dum la tempo de Zamenhof mem.

La patro, kaj Norbert Wiener mem, opiniis, ke kiam artefarita lingvo fine akiras sufiæe da idiomaøoj por esti plene esprimpova, øi ne plu estas pli facila ol etnolingvoj.

Evidente la argumento nur nerekte tuþas la alian avantaøon de Esperanto, nome øian neýtralecon, sed nun ni parolu pri facileco kaj esprimpovo.

Laŭ Zamenhof, "lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo senviva kaj tro peza"

(citita laŭ PIV, "idiotismo"). Ni mem ofte diras, ke la apero de specialaj "esperantismoj" en la lingvo estas signo de øia vivanteco.

Homo, kiu produktus Esperanton nur surbaze de eæ bona lernolibro (sen paroli pri la nuraj 16 reguloj!), produktus Esperanton nekutiman: oni devas havi kontakton kun la parolkomunumo por lerni, kiel oni kutime skribas kaj parolas. Sed æu do la evoluo neeviteble proksimigas Esperanton al la malfacilaj etnolingvoj?

Jouko Lindstedt jouko@esperanto.nu

Jen la teksto:

"As a Warsaw Gymnasium student [my father] was a contemporary of Zamenhof, the inventor of Esperanto, and although the two were students in different Gymnasia, my father was one of the first to study the new artificial language. This gives more force to his later rejection of its claims, and indeed of those of all artificial languages.

He asserted, and I believe rightly, that by the time an artificial language would have developed a sufficient tradition to be used with the intellectual precision and emotional content of the existing natural languages, it would also have developed a burden of idiom structure equal to that of its competitors.

Father's fundamental idea was that to a very considerable extent the difficulty of a language reflects the amount of thought that has come to make up its tradition, and that the English language is as dependent on its idioms for expressing complicated ideas as written Japanese (which can express every word by its phonetic notation) is dependent on Chinese characters for terseness.

Father always considered Basic English less basic than debased. No language with idioms adequate to express complex ideas concisely, he said, would be able to serve as an easy vehicle of neutrality between competing cultures".

("Norbert Wiener, "Ex-Prodigy", New York, Simon and Schuster, 1953, p.13.)

4 Bibliografioj

4.1 Aperis nova volumo de la MLA-bibliografio

Humphrey Tonkin

Lastatempe aperis, sur iom pli ol 3500 dense presitaj paøoj, la jara bibliografio de Modern Language Association por 1998. Kiel t.n. Senior Bibliographer de MLA (titolo, kiun oni atingas æefe pere de longa bibliografava vivo), kun la helpo de Detlev

Blanke, kiel Bibliographer, mi denove respondecas pri la æapitro pri t.n. helplingvoj kaj internaciaj lingvoj.

Detlev Blanke kaj mi listigas 327 verkojn en aý pri Esperanto, kiuj plejparte aperis en 1998 (kelkaj aperis pli frue kaj ne estis tiam notitaj – kaj en postaj jaroj certe estos listigitaj verkoj el 1998, kiujn ni pro iu hazardo maltrafis). La kompilaáo kovras verkojn pri aspektoj de la lingvistiko kaj socilingvistiko de la koncernaj lingvaj fenomenoj. Ni interpretas la nocion de socilingvistiko iom vaste, tiel ke øi enhavu ankaý verkojn pri la Esperanto-komunumo. La praktiko de MLA tamen estas tia, ke la bibliografio ne listigas pedagogiajn verkojn, nek recenzojn. Estas notinde, ke ne æiu verko pri Esperanto aperis en æefe Esperantaj verkoj, sed ke ankaý aperis pluraj artikoloj en fakaj revuoj nacilingvaj, ekzemple Sitzungsberichte der Leibniz-Sozietät, Language Problems and Language Planning, Waiguoyu (Æinio), Humankybernetik, Babylonia (Svislando), Terminology Standardization and Information Technology, Asiatische Studien (Svislando), kaj Rassegna Italiana di Linguistica Applicata. Kvankam tiuj verkoj estas salutindaj, ili ne sufiæas por klare montri, ke Esperanto estas studata kaj studinda fenomeno inter fakuloj.

Inter la verkoj de 1998 aperintaj æe neesperantistaj eldonejoj estas granda germanlingva libro pri interlingvistiko de Alicja Sakaguchi, kolekto de artikoloj redaktita de mi mem sub la titolo Esperanto, Interlinguistics, and Planned Language. Ankaý listigitaj kiel nove aperintaj estas Esperanto-vortaroj pri la portugala, la æeða, la ukraina, la hinda angla, kaj la itala, kaj ankaý grandega fervoja terminaro en 13 volumoj por 13 lingvoj.

Tiu tricento da verkoj en la koncerna æapitro ne reprezentas la sumon de verkoj en kaj pri Esperanto, kiuj estas listigitaj tra la volumaro. Verkoj pri literatura kritiko, ekzemple, aperas en la diversaj naciliteraturaj æapitroj, eæ se temas pri kritikoj de esperantlingvaj aýtoroj. Tiel,

ekzemple, Marjorie Boulton (reprezentata de tri artikoloj pri ðiaj verkoj) aperas inter la modernaj anglaj verkistoj, kaj William Auld inter la skotaj.

La bibliografio ne listigas originalajn kreajn verkojn, nek tradukajn, sed nur verkojn, kiuj kritike traktas originalajn verkojn. Verpajne iom pli ol 40 aldonaj artikoloj ktp. aperas ekster la æapitro pri helpaj kaj internaciaj lingvoj.

Elektronika versio de la bibliografio, en akumula formo ekde 1963 (kaj kun kelkaj miloj da verkoj en kaj pri Esperanto), estas atingebla pere de abonantaj bibliotekoj tra la mondo, æu rete æu en formo kompaktdiska.

Humphrey Tonkin
279 Ridgewood Road, West Hartford, CT 06107
Tel: +1 860-561-2669, Fax: +1 860-561-5219

4.2 Bibliografio pri Ido

Studantoj de Ido nun havas je sia dispono la preskaŭ kompletan bibliografion de ĉiuj verkoj en aŭ pri Ido:

Carlevaro, Tazio/ Haupenthal, Reinhard (1999): Bibliografio di Ido. Bellinzona: Hans Dubois; Saarbrücken: Edition Iltis. 193 p.

La verko havas detalajn enkondukojn en la franca, germana, itala, Ido kaj en Esperanto.

4.3 Trovanto helpas trovi en Vieno

La plej ampleksan kolekton pri Esperanto verŝajne posedas la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno (IEMW), alinome a sekcio Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko.

Elektronika katalogo troviĝas en la Interreto sub la adreso:

http://www.onb.ac.at/ev/online_s/onspdbfr.htm.

Pri la katalogo okupiĝas mag. Helga Farukuoye: Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Michaeler Kuppel, AT-1010 Wien, Tel.: +43 1 5355145

En kazo de ŝanĝo oni serĉu ĉe: <http://www.onb.ac.at> kaj de tie al "collections" aŭ "Sammlungen", kie vi trovos la Internacian Esperanto-Muzeon kaj ankau ĉian datumbankon.

La katalogo daŭre estas aktualigata kaj iom post iom reiros de la nuntempaj materialoj al la malpli frue aperintaj.

5 Interlingvistikaj materialoj el Italio

Grupo por Esperantologio kaj Interlingvistiko laboras ĉe Itala Esperanto-Federacio. Ĉia kunordiganto estas:

Fabrizio Pagliaroli
Contrada Barchi 20
IT-04019 Terracina

Italujo
tel. +39 0773 723518
retadreso: sn0142@speednet.it

La Grupo por Esperantologio kaj Interlingvistiko klopodas kunligi æiujn italajn interesantojn (esperantistajn kaj neesperantistajn) pri Esperantologio kaj Interlingvistiko².

Øi aranøas æiujarajn forumojn pri esperantologio en la kadro de la naciaj Esperanto-kongresoj kaj eldonigas la prelegojn tie prezentitajn. Øi, laý la eblecoj, informas pri esperantologio kaj interlingvistiko en italaj sciencaj medioj. Unu el øiaj nuntempaj projektoj estas la aperigo en la itala de libro, kiu enhavas interalie la tekston de John Wells "Lingvistikaj aspektoj de Esperanto" kaj la enkondukon de Klaus Schubert en la libro "Interlinguistics".

Æiujn prelego-kajerojn de la Forumoj eldonis CoEdEs (Milano) en la serio nomata "Materiali di Interlinguistica ed Esperantologia".

Estas haveblaj la jenaj libretoj:

- Renato Corsetti, Mauro La Torre, (1993) Quale lingua prima? Materiali di Interlinguistica ed Esperantologia 1, Milano: CoEdEs. Prezo: 10 000 liroj/ 5 eýroj.
- Silvia Lacquaniti (1994), Lingue pianificate ed Esperanto. Materiali di Interlinguistica ed Esperantologia 2, Milano: CoEdES. Prezo: 12 000 liroj/ 6 eýroj
- Michela Lipari, Pierluigi Da Costa (redaktintoj, 1996), Instruado de Esperanto: Metodoj kaj materialoj. Materiali di Interlinguistica ed Esperantologia 3, Milano: CoEdEs. Prezo: 10 000 liroj/ 5 eýroj.
- Renato Corsetti (redaktinto, 1997), Italanto: la itala variaáo de Esperanto. Materiali di Interlinguistica ed Esperantologia 7, Milano: CoEdEs. Prezo: 10 000 liroj/ 5 eýroj.
- Katalin Smidéliusz (1997), Analisi comparativa del lessico italiano ed ungherese a fini didattici. Materiali di Interlinguistica ed Esperantologia 8, Milano: CoEdEs. Prezo: 10 000 liroj/5 eýroj.

² Evidente temas pri similcela organizaáo kiel la germana „Gesellschaft für Interlinguistik e.V. GIL, (Societo pri Interlingvitiko). Pri øi kp. lastatempe en IPI n-ro 22 (3/98), p. 2 – 20; n-ro 27 (4/98), p. 6-7; krome la ampleksan artikolon pri GIL en „Esperantologio - Esperanto Studies“ 1(1999), n-ro 1.

- Nino Vessella (1997), Kompara analizo de la sýahila kaj Esperanto. Materiali di Interlinguistica ed Esperantologia 9, Milano: CoEdEs. Prezo: 10000 liroj/ 5 eýroj.
- Nicolino Rossi, Renato Corsetti (redaktintoj, 1999), Altigu vian lingvan nivelon: Literaturo en Esperanto. Materiali di Interlinguistica ed Esperantologia 10, Milano: CoEdEs. Prezo: 10 000 liroj/5 eýroj.
- Fabrizio Pagliaroli (redaktinto, 1999), Naturismo kaj skemismo en Esperanto. Materiali di Interlinguistica ed Esperantologia 11, Milano: CoEdEs. Prezo: 10 000 liroj/ 5 eýroj.

Æiuj libretoj estas mendeblaj æe CoEdEs: Cooperativa Editoriale Esperanto, via Villorresi 38, IT-20143 Milano, Italio, tel. kaj telefakso +39 02 58100857, poŝtæekonto 13647201, ret-adreso <G.Polerani@agora.stm.it>.

Aperis krome en du versioj libreto, redaktita de Daniele Vitali, pri "La linguistica e l'Esperanto" ³kiu estis sendita al æiuj italaj lingvistoj.

Ni ankaý dissendas la disertacion de Federico Gobbo æe la Universitato de Torino, "Il dilemma dell'esperanto - tra vocazione ausiliaria e naturalizzazione"⁴, paghoj 253, prezo: 45 000 italaj liroj/25 euroj.

Fabrizio Pagliaroli

6 Panøitaj retpaøoj pri interlingvistiko

- Gesellschaft für Interlinguistik: <http://www.snafu.de/~blanke.gil/gesellsc.htm> (en la germana kaj angla, bibliografio, informoj pri GIL)
- Esperanto Studic Foundation (Mark Fettes): <http://esperantic.org/> (Esperantic Studies Foundation, Centro de Esploro kaj Dokumentatdo pri la Monda Lingvo-Problemo, lpl, Language Problems & Language Planning, multaj ligoj al aliaj interlingvistikaj paøoj).
- LIU Haitao : <http://htliu.yeah.net> (i.a. bibliografio pri interlingvistiko kaj planlingvoj, listo de interlingvistoj, novaj publicaåoj pri i-ko, publicaåoj de LIU Haitao, i-ko en Æinio, multaj ligoj al aliaj interlingvistikaj paøoj)

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo

³ Kp. lpl 25 (2/98)

⁴ Kp. lpl æi-numere p. 3

(CED) æe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Red.: Detlev Blanke,
Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin,tel.:++ 49-30-54 12 633, fakso:++ 49-30-54 56
742.

< blanke.gil@snafu.de > Mendojn oni direktu nur al UEA, kontribuojn nur al la redaktoro, se eble per la retpoŝto aŭ diskede. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Estas bibliografiitaj nur posedataj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro.
